

Raporto de ILEI-delegitoj pri la Ĝenerala Konferenco UNESKO 2019

La 40a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazis de la 12a ĝis la 27a de novembro en Parizo.

Ekde la unua tago ni dispartigis inter ni la flugfoliojn tradukitajn al 18 lingvoj kaj Martine Demouy disdonis al ni la liston de antaŭviditaj parolantoj; sin anoncis pli ol 178 el 193 partoprenantoj membroŝtatoj.

La nova teamo provis malkovri ne nur la homojn sed ankaŭ la lokojn por la nova tasko. ILEI havis 5 delegitojn, kiuj konsciis en kiu maniero, kun kiuj homoj ili pretas rilati; kaj certe, ĉiu el ni varbis en koridoroj, vicoj, restoracio kaj kokteloj. Oficiale ni kontaktis 60 ŝtatojn en la granda salono. Bedaŭrinde, kelkaj delegacioj alvenis ĉiam lastminute kaj estis malfacile renkonti ilin.

Tiun jaron pli ol 200 ŝtat- kaj NRO-reprezentantoj petis parolvicon, kaj inter la lastaj UEA. François Lo Jacomo brile alparolis la publikon.

<https://www.facebook.com/ngounesco/videos/434908283861489/?t=10>

Same kiel en 2017 la ĉefaj temoj rilatis al la celoj 2015-2030: daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj. Multaj parolantoj plendis pri translokiĝo de homoj, lernejoj detruitaj... kaj pledis por altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco, protektado de la indiĝenaj lingvoj kaj de mondaj heredaĵoj, rajto sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj. Multaj delegacioj parolis pri multflankeco.

Same kiel en 2017, kiam eblis, ni provis prezenti al homoj dokumenton en ilia gepatra lingvo. La angla lingvo estis uzita 95-foje, la franca 30-foje; la reprezentantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj ni aŭdis 15 fojojn la araban, 16 fojojn la hispanan, 3 fojojn la rusan kaj 1 fojon la ĉinan. Pli kaj pli da ŝtatoj ŝatas uzi sian nacian lingvon, tiel ni aŭdis 4-foje la portugalan, po 1 kelkajn aliajn lingvojn, la hindan, la serbo-kroatan, la turkan, la korean kaj kanzonon en la maori lingvo. En Myanmar 54 lingvoj estas instruataj.

Lundon la 18an de novembro 2019 okazis la transdono de la « Atlaso pri la indiĝenaj popoloj en Kanado » al la biblioteko de UNESKO. La honora invitito kaj transdonanto estis Wilton Littlechild, granda ĉefo, kiu reprezentas la Asembleon de la Unuaj Nacioj en Kanado.

La 20an de novembro pli ol 400 gelernantoj invadis la salonon por festi la 30an jariĝon de la Rajtoj de la Infanoj. La franca Prezidento Emmanuel Macron ĉefe invitis ilin lukti kontraŭ ĉikanado kaj seksa turmentado. Kuraĝe du adoleskantoj

atestis pri siaj suferoj. Poste infana koruso bele kantis kanzonon, kiu rilatas al la problemoj de migrantoj, kaj venis fama franca slamisto: "Grand corps malade". En sia kanzono li uzis rekantaĵojn por amdanki al siaj gepatroj.

La 5 ILEI-reprezentantoj estis Martine kaj Max Demouy, Jesper Jakobsen, kiu povis ĉeesti nur unu tagon, Josiane Moirand kaj Monique Arnaud. Tre agema teamo, bonega etoso.

Raportis Monique Arnaud